
Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Januaro-Februaro 2015 | n-ro 1–2 (1315-1316)

# Sennaciulo

Oficiala organo de SAT




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!




# & La kurdoj defendas nin ĉiujn

Mi ne estas kurdo. Mi ne konas eĉ unu vorton el la kurda lingvo. Mi tute ne kapablus citi iun nomon el kurda aŭtoro. La kurda kulturo estas tute fremda al mi. Tamen okazis, ke mi manĝis pladon kuiritan laŭ kurda stilo... Nu, detalo. Hodiaŭ, mi estas kurdo. Mi pensas kurde, mi parolas kurde, mi kantas kurde, mi ploras kurde. La kurdoj sieĝataj en Sirio ne estas kurdoj, ili estas partoj el la homaro, kiu rezistas kontraŭ la mallumo. Ili defendas sian vivon, sian familion, sian landon, kaj samtempe, vole aŭ ne, ili konsistigas la nuran remparon kontraŭ la "Islama Ŝtato". Ili defendas nin ĉiujn, ne kontraŭ fantazia islamo kiun tute ne reprezentas la teroristoj el Daeŝo, sed kontraŭ la plej barbara gangsterismo. Kiel la laŭdira koalicio kontraŭ la buĉantoj povus esti kredinda, dum, pro malsamaj kialoj, multaj el ĝiaj membroj partigis kun ili (kaj, por iuj, plu partigas) strategiajn, politikajn kaj ekonomiajn interesojn? Kontraŭ la cinikismo kaj la morto, hodiaŭ, ĉeestas la kurda popolo.

Charb, direktoro de *Charlie Hebdo* en *La Homaro* (*L'Humanité*),
la 22an de oktobro 2014



# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Kiel anoncite pasintnumere, la jarkolekto 2015 de *Sennaciulo* komenciĝas kun nova enpaĝiganto. Venis pluraj proponoj, kiujn la PK pristudis el financa, principa kaj praktika vidpunktoj. Estis decidite doni prioritaton al volontula laboro, kaj en tiu ĉi kadro Nicolas Raymond eklaboris en januaro.

Ĉi-foje la proponita tem-dosiero ne vekis grandan verkemon. Feliĉe, aldone al kelkaj bone provizitaj kutimaj rubrikoj, venis sufiĉe multaj libertemaj kontribuoj, ĉu pri arto, ĉu pri sociaj aferoj, ĉu pri rilatoj inter homoj kaj ilia vivmedio. Jen bonvena rememorigo de la principo, laŭ kiu Sennaciulo antaŭ ĉio respegulas la kreemon de siaj kontribuantoj.

Laste, se vi jam decidis partopreni, provu frue plenigi vian paperan aliĝilon por la SAT-Kongreso en Nitro, aŭ enskribiĝi pere de la reta formularo. Tiel vi helpos al la organizantoj plej komforte antaŭplani la aranĝon.

Agrablan kaj kunlabor-instigan legadon deziras al vi

La Redaktoskipo

# *Venontaj temdosieroj*

## Scienco

Dosiero en preparo. Kontribuoj jam ricevitaj.

## Novaj situacioj ĉe politikaj partio

Kontribuoj bonvenaj ĝis la 31-a de marto

Kunordigas José Maria Salguero (Kani),

Rena 11 Bajo Derecha, ES-06400 Don Benito.

Rete: saliko69@hotmail.com

**Atentigo pri kotiz-pagoj el Nederlando**

Kamaradino Corrie Kwantes, kiu diligente kaj dankinde plenumis la taskon ekde 2001, sciigis la PK-on ke ŝi ne plu povas zorgi pri peranta laboro en Nederlando. Provizore, nederlandanoj do estas petitaj ĝiri siajn kotizojn rekte al la pariza bankokonto de SAT (vidu paĝon 42). La PK bonvenigos sinproponojn pri anstataŭanto.

# *Enhavo*


## Temdosiereto "Ĉu la maldekstruloj povas esti riĉaj ?"

4 Pri riĉo kaj feliĉo PEDRO SANZ
5 Ĉu eblas esti maldekstrulo kaj riĉa? MARKOVO VITO
6 Balado pri la agrabla vivo BERTOLT BRECHT

## Socio

7 Sistemo de lerneja edukado en Pollando MIR-KO
10 Kampanjo "Armilojn por la PPT/IPT" TRAD. NIKOLAS XIL CARVALHO

## Ekologio

13 Geertman-proceso TRAD. ROB MOERBEEK
14 Denove grava naturkatastrofo trafis Filipinojn ROB MOERBEEK
15 Biciklado, specifa rilato al tempo kaj spaco TRAD. DIANA RIŜAR
16 For la nov-nikotinoidojn! TRAD. ROBIN' BETO
18 For la nov-nikotinoidojn! - La petskribo TRAD. ROBIN' BETO
20 Akvon por ĉiuj! RIKARDO SCHNELLER

## Beletro

22 María Ángeles Maeso, engaĝiĝinta voĉo de la nuntempa hispana liriko MIGUEL FERNÁNDEZ
24 Letero al mia filino ROGER CONDON

## Poezia angulo

26 La paketo de l' kara Dio TRAD. CEZAR
27 Dum ploroj preterpasas TRAD. CEZAR
28 Ŝajnblindulo CEZAR
La feliĉo-difino ANTONIO MARCO BOTELLA
29 Prezidantologiko CEZAR

## KoKino

29 Du filmoj por vidi VJEKO MARKOVO KAJ MARKOVO-VITO
30 Ni ne plu vivu kiel sklavoj! — el Ateno TRAD. ROBIN' BETO

## Intelekta Memdefendo

33 Novaj cerbumigoj
Solvoj de l'cerbumigo de la numero novembro-decembro 2014
34 Solvoj de leganto SERĜO SIR'

## Liberecana Frakcio

35 Liberecanaj renkontiĝoj pri arto kaj kreivo
37 SATeH kaj la hispana liberecana movado MIGUEL FERNÁNDEZ
40 Max Nettlau aŭ la leciono pri modesto TRAD. FERNANDO DE DIEGO
Mi konas ĉiujn fabelojn TRAD. MIGUEL FERNÁNDEZ

## SAT-anoj aktivas

41 Pri servo de manĝaĵo en Sapporo, Japanio ĴON KURTENO HASEGAWA
Prezentado de SAT-DVD "Esperanto" en Sapporo, Japanio Miyazawa Naoto

## El la SAT-administrejo

42 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj



*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***